2e Année. N° 18. Le Numéro : 10 cts. Juillet 1912.

# LA DEK-SEPA

Organe Mensuel Espérantiste.

Rédaction et Administration : **H. de COPPET**
**179, Boulevard Pereire, Paris.**

Abonnement : **1 franc** par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

## GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

**Groupe Espérantiste du XVIIe Arrondissement de Paris.**

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière. Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

## GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

**Groupe Espérantiste du XVIIe Arrondissement de Paris.**

### *Assemblée Générale constitutive du 3 Juillet 1912.*

La séance est présidée par M. Després, doyen d'âge assisté, comme secrétaire, du plus jeune assistant, M. Robert Germain.

L'Assemblée décide de considérer comme membres du Groupe :

1° les membres de l'ancienne Section du 17e Arrondissement du Groupe de Paris qui y consentent et qui ont payé cotisation pour 1912 ;

2° les personnes qui paieront une cotisation actuellement et qui feront partie du Groupe pour 1913 (soit 82 membres).

Les Statuts (dont on trouvera un exemplaire d'autre part) sont adoptés, article par article, à l'unanimité. L'ensemble des Statuts est adopté à l'unanimité.

Le président déclare le Groupe fondé.

L'élection du Comité donne les résultats suivants : Sont élus : MM. Bollack (30 voix), de Coppet (28 v.), Chilard (28 v.), Grosset (27 v.), Desprès (26 v.), Van Etten (25 v.), Caballero (22 v.), Mlle Talvat (21 v.), MM. Poublanc (21 v.), Millien (19 voix).

La séance est levée.

☆

Le Comité s'est réuni le 5 juillet et a élu pour un an le Bureau suivant :

Président, M. H. de Coppet ; Vice-président, M. G. Grosset ; Secrétaire, M. R. Bollack ; Trésorier, M. Daniel ; Bibliothécaire, M. Van Etten.

M. Daniel remplace provisoirement dans le Comité M. Millien, démissionnaire.

---

## Avis très important.

Le premier Diner mensuel de notre Groupe aura lieu le Mercredi 4 Septembre 1912, à 8 heures précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

---

## Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVIIe Arrondissement

La Section, convoquée en Assemblée Générale extraordinaire, s'est déclarée dissoute par 50 voix contre 5 et 2 abstentions sur 57 membres présents ou représentés.

*Pour le Comité :*

Robert Bollack
ancien secrétaire.

Henri de Coppet
ancien président.

# Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa ».

En sia lasta eksterordinara kunveno, la 3-an de Julio, la Sekcio de la 17-a Kvartalaro de l'Grupo Esperantista Pariza voĉdonis kvazaŭ unuanime (50 por, 5 kontraŭ, kaj 2 blankaj bultenoj) sian liberiĝon el la Pariza Grupo, por retrovi sian plenan sendependecon, kiun ĝi jam ĝuis de la jaro 1902 ĝis 1908, kaj kiun ĝi neniam devus esti fordoninta.

La novaj statutoj de l'Grupo (kies ekzempleron oni trovas en la sama numero) estas starigitaj laŭ la plej simpla kaj libera maniero kaj la diversaj membraj kotizaĵoj permesos al aprobantoj de nia kara afero enviciĝi en nian grupon laŭ iliaj financaj rimedoj.

En nia grupo, ĉiuj opinioj estas respektataj, ĉar ni ne forgesas, ke Esperanto estas vivanta lingvo de libera popolo, laŭ la tiel bela esprimo de nia samideano Privat.

Kiel la titolo mem de nia Grupo ĝin montras, ni restos fidelaj al la Fundamento, vera *sola* bazo de l'estonta sukceso de nia kara lingvo. Respektante ĝin, ni respektos nin mem kaj la evolucio de la lingvo restos tiamaniere konforma je la kulto, kiun devas profesii ĉiu vera Esperantisto kontraŭ trezoro al li konfidita, kaj por kiu li estas responda antaŭ la tuta homaro.

Fondante nian Grupon, ni anoncas ĝian ekzistadon al ĉiuj esperantistaj rondetoj, societoj aŭ asocioj, sciigante al ili, ke ni **plej varme** deziras labori **pace** kaj **vivi bonrilate** kun ĉiuj ekzistantaj grupoj.

Ni daŭrigos semi kaj semi konstante, neniam laciĝante, ĝis ni atingos la « celon en gloro » !

Ekstarigante sur tiujn bazojn nian

**" Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa » "**

mi fundkore deziras al ĝi longan kaj prosperan vivon inter la veraj fideluloj de nia kara lingvo.

*Vivu longe Deksepuloj,*
*Lingve, frate engrupiĝu ;*
*Restu ĉiam fideluloj,*
*Por ke celo atingiĝu.*

*Henri de Coppet.*

# ★ Jubilé de l'Esperanto ★

## ☆☆☆☆☆ 2 Juin 1887 — 2 Juin 1912 ☆☆☆☆☆

Le 2 Juin 1912, en soirée, de nombreux Espérantistes ont fêté, à Paris, comme il convenait, le 25me anniversaire de la naissance de l'Esperanto.

L'honneur de l'organisation de cette fête revient tout entier à la « Zamenhofa Artista Adeptaro », de fondation récente, mais déjà remarqué par tous, en raison des résultats obtenus.

La Salle des Fêtes de la Mairie du Ve Arrondissement de Paris nous avait été aimablement prêtée pour la circonstance.

Au nombre des assistants se trouvaient Mme M. Tiard, présidente de la Fédération de Provence, M. Rollet de l'Isle, président de la Société Française pour la propagation de l'Esperanto, M. Th. Cart, vice-président de cette même Société.

M. Cart, qui présidait la fête, en quelques mots émus a rappelé à l'assistance la signification de cet anniversaire, et après avoir salué au nom de tous le Docteur Zamenhof, a adjuré les Espérantistes de rester fidèles à notre langue et à notre idéal.

Le programme était attrayant. M. Devjatnin a récité une poésie inédite. Mmes Rémond et Dianto, Mlles Smeraldo et A. Capra ont récité, M. Grosset a chanté, Mlle M.-Th. Capra a tenu le piano ; l'orchestre « Estudiantina Cœcilia », conduit par M. Besnard, nous a joué de fort jolis morceaux. Beaucoup d'enthousiasme, beaucoup d'applaudissements mérités ; enfin il y a eu (comme surprise) « La Espero » (hymne espérantiste, de M. de Coppet) et la « Preĝo de Boulogne » (voix de M. Devjatnin) dans le phonographe.

La presse espérantiste était abondamment représentée : Mlle Royer *(Juna Esperantisto)*, MM. Cart *(Lingvo Internacia)*, Rollet de l'Isle *(Bulletin Officiel de la S. F. P. E)*, Houbart *(La Movado)*, Frechas *(Le Monde Espérantiste)*, et de Coppet *(La Dek-Sepa)*.

D'autres groupes ou sociétés célébreront soit avant, soit pendant le Congrès de Cracovie cet anniversaire glorieux : mais remarquons avec plaisir que la « Zamenhofa Artista Adeptaro » a donné le signal et a célébré le Jubilé à sa date

exacte du 2 Juin. Nos amis Devjatnin, van Etten et Blangarin, membres du Comité de « Z. A. A. », méritent pour cela les remerciements des Espérantistes... et fidèles Fundamentistes.

*Robert Bollack.*

# L'Esperanto à Paris.

A partir de ce numéro, nous ouvrons cette nouvelle rubrique qui rendra compte aux « Dek-Sepuloj » de tout ce qui se dit et de tout ce qui se fait à Paris, au sujet de l'Esperanto.

Nous invitons donc tous les Groupes Parisiens à nous envoyer régulièrement des communiqués, annonces de fêtes, excursions, etc.

☆

— On annonce, pour le 23 juillet, la fête annuelle pour célébrer l'anniversaire de l'Esperanto. Pour tous renseignements, s'adresser à « Paris-Centre ».

— Le Groupe Espérantiste de Montmartre « Verda Stelo » vient de voter, dans sa dernière Assemblée générale (21 juin), un ordre du jour protestant contre les projets d'Impôt et d'« Internacia Reprezentantaro ».

— L'Association « Les Amis de Paris » qui comprend plus de 2500 membres, vient d'adhérer à l'U. E. A., comme « Esperantia Entrepreno ».

— La nouvelle Section du XIII[e] Arrondissement a eu l'honneur de voir son président, M. Guérineau, nommé Maire du XIII[e] arrondissement. Toutes nos sincères félicitations.

— Le journal « L'Effort Social » va publier régulièrement une rubrique en Esperanto.

— Un nouveau groupe vient d'être fondé à Asnières. Président : M. Romano ; secrétaire : M. Fradet. Ĉiujn niajn bondezirojn !

— Comme l'an dernier, notre ami, M. Génermont, vient d'être chargé par l'U. E. A. d'organiser une caravane pour le VIII[e] Congrès.

H. van Etten.

# LA MONATO ESPERANTISTA

Depost la lasta monato, ne okazis multaj gravaj okazintajoj. Tial, mia monata raporto konsistas precipe el gazeteltirajoj, kies gravegeco tuj montriĝos al niaj legantoj.

La lasttempaj plej interesaj okazintajoj estas : la V-a Kongreso de la Brita Esperanto Asocio, en Portrush (Irlando), 26-28. de Majo, kaj la ĉiujara « Esperanto-Tago » ĉe la *White City* en London, 15. de Junio — (*British Esperantist,* Junio.)

La 2-an de Junio, la Paris'aj Esperantistoj solene festis la Jubileon de Esperanto, dum niaj germanaj samideanoj ankaŭ festis en Dresden, tiun memorindan datrevenon. — (*Esperanto,* 20. Majo 1912).

La 16-an de Junio, okazis kun granda sukceso, la Kongreso de la Esp. Normanda Federacio en Louviers.

Nun, alproksimiĝas la VIII-a Kongreso en Krakow, kaj multiĝas la gazetaj artikoloj pri la « Reprezentantaro ». Unu el la plej citindaj estas tiu : « *Rekomendoj de la Komitato de la Brita Esp. Asocio :* — La B. E. A., kunveninte en sia Kvina Ĉiujara Kongreso — *Konsiderante,* 1) pro tio, ke la delegitoj en Antwerpen devis decidi subite pri la demando pri kotizo donanta rajton sendi delegiton al niaj Esperantistaj Kongresoj Oficialaj, antaŭ ol ili havis la tempon por dece konsiliĝi kun la ilin delegintaj grupoj..... *opinias,* ke la definitiva apliko de tiu regulo pri delegitoj al la Oka Kongreso ne estas pravigita, — *protestas* kontraŭ ĝi. *Opiniante* la aferon ankoraŭ ne konstitucie decidita..... elektas po unu delegito por ĉiu aro de siaj elektantaj membroj, *sen ia ajn pago de kotizo.* — 2) *Rekomendas,* ke la delegitoj por la Oka Kongreso, resendu la tutan demandaron al la Naŭa Kongreso..... » k. t. p. — (*British Esperantist,* Junio.)

Neniu plua vorto estas aldoninda !

SE VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

**MAYA BULGARE**

Bulgara Lakta Kazeajo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

**Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris.** Téléphone 214-40.

# GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

(Déclaré conformément à la loi.)

*Siège social : 179, Boulevard Pereire, Paris (17ᵉ arr.).*

## STATUTS

### ARTICLE I.

Sous le titre « Groupe Espérantiste du XVII^me Arrondissement de Paris » — « Grupo Fundamentista *La Dek-Sepa* » — est formé un groupe espérantiste, ayant pour but d'unir intimement les adhérents par des réunions amicales, cours, promenades, etc., et d'aider, dans l'arrondissement, à la diffusion de l'Esperanto, tel qu'il a été défini dans le « Fundamento » du Dʳ Zamenhof.

Le siége social du Groupe sera fixé toujours dans le 17ᵉ arrondissement, au domicile du Président ou au domicile d'un membre du Conseil, que celui-ci désignera à cet effet.

### ART. II.

Toute personne, sans distinction de sexe ni de nationalité, pourra devenir membre du Groupe, à la seule condition d'être présentée par un membre du Groupe et d'être ratifiée par le Conseil.

### ART. III.

Le Groupe comprend :

1° Des membres d'honneur, personnes dont la haute situation sociale apporte un appui moral au Groupe. Ils ne paient aucune cotisation.

2° Des membres bienfaiteurs qui paient une cotisation annuelle de Fr. 10 minimum ou une somme une fois donnée de Fr. 200.

3° Des membres donateurs qui paient une cotisation annuelle de Fr. 5.

4° Des membres actifs qui paient une cotisation annuelle de Fr. 3, payable d'avance.

### Art. IV.

L'Assemblée générale se compose des membres ayant payé cotisation, elle sera convoquée par le Président du Groupe, au moins une fois par an, 8 jours à l'avance. Les votes par mandataires seront admis à condition que ces derniers fassent partie du Groupe.

### Art. V.

Le Conseil est composé de 10 membres. Il sera renouvelé par moitié, chaque année. Les membres sortants sont rééligibles. Le Conseil du Groupe se réunit au moins une fois par trimestre.

Le Conseil élira son bureau qui se composera d'un Président, un Vice-président, un Secrétaire, un Trésorier, un Bibliothécaire.

### Art. VI.

Les présents statuts pourront être modifiés par n'importe quelle Assemblée générale ordinaire.

### Art. VII.

La dissolution du Groupe ne pourra être prononcée que par une Assemblée générale extraordinaire, convoquée 1 mois à l'avance. Elle devra réunir au moins les 2/3 des membres du Groupe.

Si ce nombre n'est pas atteint dans une première Assemblée, une seconde Assemblée sera convoquée et celle-ci pourra prendre une décision valable, quel que soit le nombre des votants.

Les votes dans ces Assemblées se font à la majorité absolue des membres présents ou représentés.

Centra Presejo Esperantista V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

El nia bonega centra organo *Lingvo Internacia* (Aprilo) ni ĉerpas jenajn linioju :

« Kiajn garantiojn aliparte oni donas al ni per tiaj aŭtokrataj decidoj, ke la reformistoj, plibonigistoj, idistoj ne sendos ankaŭ siajn rajtigitajn " Delegitojn ", tial ke sufiĉas " pagi kaj aboni " ? Bone estus, antaŭ ol paroli pri ia esperantista Parlamento, praktiki iom le parlamentajn kutimojn, kiuj regas en ĉiu civilizita Ŝtato. Sed, laŭ plej senpartiaj kaj senpasiaj homoj, nedube estas, ke en Antverpeno pro nesperteco neniun ideon oni havis pri tiaj kutimoj, kaj nun oni daŭrigas : *sic volo, sic jubeo !* »

Sub la plumo de Abato Richardson, en *Espero Katolika*, estas legataj la sekvantaj linioj, plenaj je inteligenteco kaj vereco :

« Permesu al mi nepre protesti kontraŭ la trouzo de la vorto " Esperantistaro ", trouzo, kiu, laŭ mi, estas la kaŭzo de la tuta disputo inter lojalaj Esperantistoj, kiuj nur deziras interkonsenton. La proponita Komitato de rajtigitaj delegitoj ne reprezentos ĉiujn societojn. Laŭ mia propra sperto, ekzistas en diversaj landoj malgrandaj, sed tre agemaj grupoj kaj grupetoj, kiuj, por diversaj kialoj, ne aliĝis al iu ajn nacia organizo..... » k. t. p. — (*Espero Katolika*, Esperanto-Movado, Junio.)

Finante mian resumeton, mi aldonos :

Nia devizo estu : Ni iru Krakovon, ne pagante la proponitan imposton !

*H. van Etten.*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆


KONTRAŬ **MAR-MAL-SANO**

# DELPHININE

KONTRAŬ **FERVOJ-MAL-SANETO**

De l' DOKTORO FLASSCHŒN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : **10** fr. (**4** $S$).

**Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.**

# EN LOUVIERS

Dimanĉon, la 16-an de Junio okazis en la urbo Louviers (Eure), la jara Kongreso de la « Federacio Esperantista de Normandie ».

Matene okazis en la urbdomo la kunveno de la federaciaj delegitoj. Dum tiu kunveno estas decidite, ke la Federacio ne sendos rajtigitajn delegitojn al Krakovo, sed lasos ĉiun grupon agi laŭ ĝia volo ; estas akceptita deziresprimo por plialtigi la kotizaĵon al la S. F. P. E.

Okazis festeno kun multa ĉeestantaro : post la festeno inter la paroladantoj ni rimarkis S-ron Petitot, inspektoro de la unuagradaj lernejoj en la distrikto de Louviers : li plene aprobas nian lingvon kaj certigas nin pri sia simpatio.

Ĉarma kaj memoriginda estis la akcepto : partoprenis tiun festtagon Esperantistoj el Louviers, Rouen, Le Hâvre, Bolbec, Oissel, Sotteville, Coutances, Alençon, Versailles kaj Paris (« Dek-Sepa », « Latina Kvartalo », « Verda Stelo »).

Ne estas nia kutimo en tiu gazeto senutile glorigi la personecon de niaj samideanoj ; tamen, ni nin sentas devigataj publike danki la estimatan prezidanton de la Esperantista Grupo de Louviers (samtempe vicurbestro de la urbo), S-ron Bontemps, kaj ĉiujn Louviers'ajn grupanojn pro la bona organizado de tiu sukcesplena Kongreso.

ROBERT BOLLACK.

**Muzikeldonejo A. BESNARD**

**26, rue Antoinette, 26 -:- PARIS**

Esperantia Entrepreno. — Komerca Konsulo de U. E. A.
Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj, violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.
Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

**SENSACIA NOVAĴO !!! ESPERANTAJ DISKOJ !!!**

| | | |
|---|---|---|
| KANTOJ | **La Espero** . . . . . . . . | L. L. ZAMENHOF |
| | **Al vi** . . . . . . . . . . | BEMBERG |
| DEKLAMOJ | **Preĝo sub la verda standardo** | L. L. ZAMENHOF |
| | **Blanka vualo** . . . . . | V. DEVJATNIN |

*Ĉiu duobla disko :* **4 fr. (1,600 Sm.)**

**Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.**

# VENĜO

(Laŭ Ĉeĥov.)

Rakonto de ofendita edzo.

---

Malbenita kanajlo komercistaĉo !... Kian teruran situacion li kreis por mi !... Aŭskultu, karaj amikoj, kio okazis !

Antaŭhieraŭ diablo min tentis viziti kune kun mia edzino maskobalon. Mia edzino, en kostumo de « Afrikanino », estis belega kaj faris fortan impreson al la junularo, kiu tute lacigis ŝin per siaj invitoj por dancado.

Je la dua nokte oni forprenis la maskojn, kaj tiu ĉi fripono Anatolo Dando, kiu jam delonge estas neindiferenta al mia edzino, kvazaŭ alĝluiĝis al ŝi, kaj ŝi... ŝi ankaŭ estis montranta al li sian favoron....

Mi multfoje petis ŝin veturi hejmen, dirante, ke al mi doloras la kapo, ke mi tre laciĝis, k. t. p., — sed ŝi tute ne atentis miajn vortojn, kaj, kvazaŭ mokante min, ankoraŭ pli amindumis kun Dando !... Kaj, imagu, tiu ĉi arogantulo eĉ kuraĝis diri al mi, ke se mi efektive tiel laciĝis, tiaokaze mi povas sola — ĉu vi komprenas ? *sola !!*... veturi hejmen kaj ke li poste (poste !) akompanos mian edzinon !... Kaj ŝi tute aprobis lian proponon !... Kiel al vi plaĉas tiu ĉi diabla propono ?! Kompreneble, mi restis ĝis la fino mem de l'maskobalo, sed... mi decidis venĝi... puni, severe puni la malbenitan flirtulon....

Dum ili amindumis, mi streĉegis tutan mian spritecon, — vi ja scias, kiel mi povas esti sprita ! — penante eltrovi ian eksterordinaran venĝon, — kaj mi sukcesis !...

Kiam, fine, je la 6-a matene (imagu : je la sesa !!) mi kun mia ĉarma edzino revenis hejmen, en mia kapo estis preta teruregа plano de venĝo, la infera venĝo !...

Apenaŭ mia edzino, tute lacigita, ekdormis, mi prenis ŝian vizitkarton, kaj, imitante ŝian skribmanieron, skribis sur ĝi : « Mia kara Anatolo ! Mi tiel multe volas diri al vi, sed mi estas nun tro laca, kaj mia "Otello" (t. e. mi) malhelpas min. Sed morgaŭ, kiam li foriros en la oficejon, mi skribos al vi longan leteron, kiun mi metos en la kaverneton de tiu granda kverko, kiu staras ĉe la ĉefa pordo mem de l'urba zoologia ĝardeno. Venu tien ĝuste je la 9-a vespere, prenu el la kaverneto mian leteron kaj senprokraste respondu ĝin. Tutkore via, A. (Anita). »

Poste mi skribis ankoraŭ du leterojn al la fame konata riĉulo-komercisto Hoko, — kompreneble tute ŝanĝinte mian skribmanieron.

En la unua letero, je la nomo de anarĥiistoj, mi postulis, ke li je la oka horo vespere metu en la saman kaverneton de la sama kverko, apud la ĉefpordo de l' zoologia ĝardeno, koverton kun 500 frankoj, minacante, ke, se li ne plenumos tiun ĉi postulon, aŭ anoncos pri ĝi al la polico : tiaokaze li post du tagoj estos mortigita.

En la dua letero, je la nomo de l' sekreta polico, mi skribis al li : « Estimata sinjoro ! Niaj agentoj eksciis, ke unu fripono, kvazaŭ je la nomo de anarĥiistoj, postulas, ke vi donu al li 500 frankojn. Ne timu la minacojn, ĉar ni vin tre bone gardas, sed bonvolu en la montritan lokon, anstataŭ mono, meti koverton kun iaj ajn paperaĉoj kaj transdonu la ricevitan de vi leteron al la kvartalestro, rakontonte al li pri la afero, ke li aranĝu embuskon, kaj tiamaniere ni kaptos tiun friponon, kiu skribis al vi la leteron, kaŝante sin per la nomo de anarĥiistoj.... »

Ĉu vi komprenas, kion mi celis ? Dando, ricevonte la vizitkarton de mia edzino, nepre iros en la zoologian ĝardenon por preni ŝian leteron. Dume Hoko, ricevonte la leteron kun postulo de la mono kaj la leteron kvazaŭ de sekreta polico, anoncos pri la afero al la kvartalestro, oni aranĝos la embuskon, kaj kiam Dando venos en la zoologian ĝardenon, oni lin kaptos kaj sidigos en malliberejon !... Jen kian genian planon naskis mia spriteco !...

Dissendinte la leterojn, mi jam je la sepa horo vespere estis en la zoologia ĝardeno, kaŝis min ne malproksime de la kverko apud la ĉefpordo, kaj kun tute komprenebla malpacienco atendis la rezultatojn de mia sprita elpensaĵo, ĉiuminute rigardante la poŝhorloĝon kaj atente observante la enirpordon kaj la apudajn aleojn....

Fine, je la duono post la sepa, tra la pordo eniris Hoko. Li aliris al la kverko, maltrankvile ekrigardis ĉirkaŭen, nerve eltiris el la flanka poŝo negrandan koverton, enŝovis ĝin en la kaverneton de l' kverko kaj rapide foriris, preskaŭ forkuris el la ĝardeno.

Mia koro estis preta forsalti el la brusto pro la ĝojo : mi jam antaŭsentis la sukceson !... Nun baldaŭ devas esti policanoj... kaj poste... Dando !... Ha, kanajlo ! fine ci trafos en la kaptilon !... Nun ci jam ne evitos cian sorton kaj ricevos bonan rekompencon por la flirtado ĉirkaŭ mia edzino !...

De tempo al tempo tra la aleoj de l'ĝardeno estis pasantaj kelkaj sinjoroj, kvazaŭ promenante, — sed mi estis tute certa, ke tiuj ĉi sinjoroj estas alivestitaj kaj, eble, eĉ grimitaj policanoj....

Mia poŝhorloĝo montris tri kvaronojn post la oka, kiam subite tra la pordo eniris Dando. Mi preskaŭ svenis, kaj tute kuŝiĝis sur la tero, atente observante lin tra la arbetajoj.... Li rapide aliris al la kverko, enŝovis en la kaverneton sian manon, eltiris de tie la koverton, kaj, sensigeligante ĝin, alproksimiĝis al tiu sama loko, kie mi estis kaŝita, kaj haltis en la aleo tute apud mi, tiel proksime, ke mi povus atingi lin per la mano.

Kaj imagu!... Ho, teruro!... Infero kaj diabloj!!... Li elprenis el la koverto... la monon! bankbileton de 500 frankoj!!... Mi ne povas klarigi al vi, kion mi sentis: mi estis ŝtonigita, mortigita, neniigita!... Kaj mi tute klare aŭdis, kiel Dando ekmurmuris: « Hm!... kvincent frankoj... strange!... Tamen — koran dankon!... Jen efektive estas neatendita venko!... »

Li ekridetis, kaŝis la monon en la poŝon, ekfajfis ian gajan melodion kaj foriris....

Ho, kanajlo komercistaĉo!... Ho, malbenita timemulo!!... Nun mi ĉion komprenis!... Estis klare, kiel tago: li, tiu ĉi malsaĝulo Hoko, ricevinte mian leteron kun la postulo de 500 frankoj, ektimis, — kaj li... ho, diablo!... estas ja tute nature... Kion povas signifi por milionulo iaj 500 frankoj?!... Li ne volis riski sian vivon kaj preferis simple pagi tiun ĉi bagatelan sumon, por esti trankvila....

Ho, kia azeno mi estas!... Kiamaniere mi ĝin ne antaŭdivenis? Kial mi ne postulis de li almenaŭ kvin aŭ dek milojn?... Sankta Dio! kion mi faris?! Mi ja mem, propramane, puŝis mian edzinon en la brakojn de Dando!... Konsilu do, kion mi nun devas fari? Kiel eliri el mia terura kaj malsaĝega situacio?... Kiu spertis ion similan, konsilu!

*V. Devjatnin.*


# LA VERA TIZANO DE L'PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : **1** Fr. **50** (Sm. **0,60**)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

**Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.**




*Vera Ferhava Salo alsimiligebla*

ELTROVITA DE

**M. Maurice ROBIN**

*en 1881.*

**LA**

# Fer Robin

*mirinde efikas*

KONTRAŬ

SENSANGECO,
PALKOLORECO,
SANGELFLUOJ

**ĈIUSPECAJ**

**Akcelas la nutradon kaj neniam mallaksigas.**

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ce ĉiu manĝo, ĉu en iom da akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

**Por eviti la falsajojn**

**POSTULU la nomon de ROBIN**

VENDEJO POGRANDE :

**13, Rue de Poissy, PARIS**

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le Gérant : E. OLLIVIER.